# KOMITATO-KUNSIDO
# de sabato la 13-a de aprilo 2019

## 0.1. Kontrolo de la ĉeestantoj kaj rajtigitoj

Sabaton la 13an de aprilo 2019, de la 15:30a ĝis la 17:15a, kunsidis en Dovro la Komitato de Espéranto-France:

| Persona nomo | Familia nomo | Mallong. | Komitataneco | Ĉeestas | Senkulp. | Forestas | Rajtigas |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Alexandre | André | AA | Repr. de la membraro | | | ✓ | |
| Claude | Bensimon | CB | Repr. de la membraro | | ✓ | | SM |
| Raymonde | Coquisart | RC | Repr. de la membraro | | ✓ | | DL |
| Bernard | Cornevin | BC | Repr. de la membraro | | | ✓ | |
| Xavier | Godivier | XG | Repr. de la membraro | | | ✓ | |
| Julia | Hédoux | JH | Repr. de la membraro | | | ✓ | |
| Jesper | Jacobsen | JJ | Repr. de la membraro | | ✓ | | |
| Maurice | Juy | MJ | Repr. de la membraro | ✓ | | | |
| Aleks | Kadar | AK | Repr. de la membraro | | | ✓ | |
| Michael | Leibman | ML | Repr. de la membraro | ✓ | | | |
| Didier | Loison | DL | Repr. de la membraro | ✓ | | | |
| Jean-Lucien | Mazeau | JLM | Repr. de la membraro | ✓ | | | |
| Sébastien | Montagne | SM | Repr. de la membraro | ✓ | | | |
| Claude | Nourmont | CN | Repr. de la membraro | ✓ | | | |
| Armand | Salek | AS | Repr. de la membraro | | ✓ | | |
| Gilles | Tabard | GT | Repr. de la membraro | ✓ | | | |
| Flora | Markov | FM | Repr. de FET | | | ✓ | |
| Michèle | Abada-Simon | MAS | Repr. de FKEA | ✓ | | | |
| Didier | Janot | DJ | Repr. de GEE | | ✓ | | MD |
| Lucas | Teyssier | LT | Repr. de JEFO | | | ✓ | |
| Jean-Pierre | Boulet | JPB | Repr. de fed. Auvergne | | ✓ | | DL |
| Josette | Ducloyer | JD | Repr. de fed. Bretagne | | ✓ | | CN |
| Gilbert | Stammbach | AG | Repr. de fed. France-Est | | | ✓ | |
| Marianne | Pierquin | MP | Repr. de fed. Paris-Île-de-France | | ✓ | | JLM |
| Florian | Cezard | FC | Repr. de fed. Languedoc-Rouss. | | ✓ | | DL |
| Michel | Dechy | MD | Repr. de fed. Nord | ✓ | | | |
| Marie-France | Condé-Rey | MFCR | Repr. de fed. Poitou-Charentes | | | ✓ | |
| Thierry | Spanjaard | PV | Repr. de fed. Provence (anstataŭas Pascal Vilain) | ✓ | | | |
| Michael | Leibman | ML | Repr. de fed. Rhône-Alpes | ✓ | | | |
| Gilles | Tabard | GT | Repr. de fed. Limousin | ✓ | | | |

19 komitatanoj ĉeestantaj (12) aŭ reprezentataj (7) el 30. La kunsido estas kvoruma.

## 0.2. Elekto de prezidanto kaj protokolanto 5 min

GT prezidas.

DL protokolas.

### 0.3 Definitivigo de la tagordo, eventualaj aldonoj — 05 min — sume 15 min

Aldoniĝas jenaj tagorderoj:
2.13 pri Esperanto 2024
4.3 pri la bildstrio de Lilian Thuram

## 1. KUNORDIGO (administrado kaj financoj)

### 1.1. Elekto de la nova estraro — ELEKTO 25 min

Post la statuta ekskomitataniĝo de ER kaj la nerekandidatiĝo kiel komitatano de AR, neniu nuna komitatano intencis kandidatiĝi.
DL ekskomitataniĝos venontjare, post 3 elektiĝoj dujaraj.

Post longa interŝanĝo kaj demando al ĉiuj ĉeestantaj komitatanoj, jenaj volontuloj akceptis postenon:
DL prezidanto
MJ vicprezidanto
SM kasisto
JLM vickasisto
GT sekretario
ML vicsekretario
RC estrarano

Tiu provizora estraro estas unuanime elektita.
Ni decidas okazigi kroman komitatkunsidon en Parizo kun la cetero de la komitato, en majo aŭ junio. La ekzakta dato estu decidota post sondado, proponita de SM.

### 1.2 Strategio kaj laborplano por la nova Komitato — DISKUTO 15 min

(prokrastita)

### 1.3 Nova aliĝilo 2019-2020 — DISKUTO 10 min

(prokrastita)

### 1.4 Renovigo de la servilo — DECIDO 10 min — sume 60 min

SM: *La servilo kiu gastigas nian retejon kaj datumbazojn estis aĉetita en 2014 kaj indus ŝanĝi ĝin al servilo pli moderna, pli efika kaj pli sekura. Tiam la nuna servo povos esti uzata kiel pli efika laborkomputilo en la sidejo. Ni planis buĝeton de 1000 eŭroj.*

0 kontraŭas 0 sindetenas **19 aprobas**

## 2. KONSCIIGO (projektoj, ERIK = Eksteraj rilatoj, informado kaj komunikado)

### 2.1 Klubo 2000 por 2018-2019: kiel efektivigi ĝin? — DISKUTO 10 min

*La donacoj Klubo 2000 por 2018-2019 estos uzataj kiel subvencio por venigi novajn homojn al la kongreso aŭ al staĝoj en Kvinpetalo aŭ Grezijono. Sed ĝis nun, ni ne uzis ĝin. Kiel fari por efektivigi tiun subvencion? La komitato devos decidi: Kiel konsideri homon nova?*

La komitato konsentas ke la subvencioj pagu ne la transportajn kostojn, sed kotizparton rekte al la kulturcentroj aŭ al la landa kongresa kaso.
Kiu estas nova por la movado? (neniu respondo)
MAS kaj MJ proponas ke la centroj proponu nomojn.
Oni anoncu ke la novuloj petu helpon al la estraro tra la koncernaj centroj.

**2.2 Klubo 2000 por 2019-2020: kiu temo?** DECIDO **10 min**

*Propono de la komitato en januaro 2019: sendi lernolibron/vortaron/Eta princo al bibliotekoj*
*Ni ankaŭ decidos kiom da ekzempleroj indos presi.*

(prokrastita)

**2.3 Homara Festo 2019** DISKUTO **5 min**

Ĉu ni pagu por budo en septembro 2019?

0 kontraŭas 0 sindetenas **19 aprobas**

**2.4 Loĝigado de la asocio Ergodis (BEPO-klavaro) en la sidejo** DECIDO **10 min**

*La asocio* Ergodis *(kiu celas propagandi la uzadon de klavaro BEPO, kiu enhavas supersignojn de multaj lingvoj, inkluzive Esperanto*) *ne havas propran sidejon kaj ŝatus uzi la adreson de la asocio por sia ĉefa adreso. Pliaj informoj legeblas en la peto, kiun sendis Valentin Melot, kasisto de tiu asocio, la 2an de marto.*

0 kontraŭas 0 sindetenas **19 aprobas**

**2.5 Subvencio por la projekto Starmania en Esperanto** DECIDO **10 min**

*Guillaume Harmide deziras prepari spektaklon Starmania en Esperanto en la UK en Montrealo en 2020.*
*Li petas subvencion je 1000 eŭroj de Esperanto-France.*

*(prokrastita)*

**2.6 Projekto Espero** DECIDO **5 min**

*Ĉu Esperanto-France povos esti peranto kaj kolekti donacojn (per nia UEA-konto ufea-s) por tiu projekto?*

0 kontraŭas 0 sindetenas **19 aprobas**

**2.7 Flugfolioj por lernejoj** DECIDO **10 min JD/ML**

Okazos decido antaŭ julio por ebligi disdonadon komence de studjaro.

0 kontraŭas 0 sindetenas **19 aprobas**

**2.8 Trovi novan volontulon por zorgi pri Afrika Solidareco** DECIDO **10 min**

(prokrastita)

**2.9 Agado por instigi UNESKO aldoni Esperanton al la listo de nemateriaj kultural heredaĵoj**
DISKUTO **5 min MJ**

(prokrastita por venigi FLJ kaj/aŭ Renée Triolle kaj/aŭ Barbara Despiney)

**2.10 Letero sendota al la politikistoj** INFORMO **5 min MJ**

MJ sendos sian projekton.

**2.11 Raporto pri la renkontiĝo kun PEEP, plano pri CNED, agadoj rilataj al PEEP kaj letero al la ministro rilate al la nova bakalaŭreo** INFORMO **5 min MJ**

Sendita de MJ : legota kaj printota por MAS.

**2.12 Krei laborgrupon por serĉi patronojn** INFORMO **5 min MJ**

Guy Camy pretas partopreni

ekzemple : Lilian Thuram

**2.13 Esperanto 2024**

Ĉu EF principe konsentas por subteni tiun projekton de JLM?
Prezentota en la komitatkunsido oktobra.

sume 90 min

## 3. KOMUNUMO (kongresoj, ...)

**3.1 Kongreso de Espéranto-France 2020** **DISKUTO** **15 min**

Eble la kongreso de Espéranto-France 2020 povus okazi en Lyon ?

**3.2 UK en Lahti: elekto de komitatano A por reprezenti EF** **DECIDO** **5 min** **CN**

CN kandidatas.

0 kontraŭas 0 sindetenas **19 aprobas**

**3.3 UK en Lahti: kunlaborantoj por movado Foiro kaj aliaj agadoj** **INFORMO** **5 min** **CN**

Skribi al ufe-anoncoj
DL ĉeestos.
GT ĉeestos.

sume 25 min

## 4. KAPABLIGO (instruado kaj ekzamenoj)

**4.1 Organizi renkontiĝon por korektantoj de ikurso** **DECIDO** **10 min** **AR**

*Por plibonigi la kunlaboradon de ĉiuj korektantoj de ikurso, Axel deziras organizi unu-tagan renkontiĝon en oktobro 2019 en Parizo. La budĝeto estos ĉirkaŭ 1000 eŭroj por pagi vojaĝkostojn.*

0 kontraŭas 0 sindetenas **19 aprobas**

**4.2 Eldoni tradukon de Lucky Luke en Esperanto** **DECIDO** **10 min** **AR**

Axel faros
0 kontraŭas 1 sindetenas **18 aprobas**

**4.3 Eldoni bildstrion de Lilian Thuram en Esperanto**

MAS tradukis ĝin kaj proponis tion dum la jarkunsido ĉi-matene.
0 kontraŭas 0 sindetenas **19 aprobas**